

Christian Winther,
Ripozo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Foras la suno, la tago forplonĝas,
staras la nuboj jen ĉe l' ĉielrand',
lumas la steloj; dormetas kaj songas
en trankvilego la mar' kaj la land'.

Aĥ, se mi povus, nun kiam finiĝos
mia viv-tago, - samkiel jen flor' -
turni kun fido, ĝis ree tagiĝos,
min al la juna matena aŭror'!

*Traduko de la Dana poemo "Hvile" de CHRISTIAN WINTHER (Kristiano Vintero, *1796 - †1876) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 1984-10.04.*

MR-158-3 / Arg-244-494 (2004-06-10 11:11:55)

Christian Winther,
Sun' estingiĝis

tradukita de Hans Erik Jensen

Sun' estingiĝis, tag' denove mortis,
Nuboj leviĝis, nokton al ni portis,
steloj ridetas milde sur ĉielo tra la malhelo.

Ho, kiam venos al mi la tagfino,
do mi ĝin benos pie per kapklino.
Fine mi dormos pace kiel floro ĝis la aŭroro!

*Traduko de la Dana poemo "Hvile" de CHRISTIAN WINTHER (Kristiano Vintero, *1796 - †1876) en Esperanton de HANS ERIK JENSEN (†1973-06-18).*

Arg-244-923 (2008-09-14 00:00:04)

La kanto-teksto estas libere tradukita de la dana esperantisto Hans Erik Jensen. La traduko troviĝas en la kant-libreto "Kantu", eldonita de H. E Jensen kaj Harald Grønborg, sur la paĝo 18, kanto n-ro 17. Ĝi estas kantebla laŭ melodio de Hakon Andersen (laŭ indiko notita super la teksto en la kantlibreto.) Pri Hans Erik Jensen vidu ankaŭ la retejon: <http://www.esperantonia.dk/bio-hej.htm>.

Christian Winther,
Hvile

Solen er slukket, dagen forstummer,
skyerne stå ved himlens rand,
stjernerne smile; drømme og slummer
favne i stilhed hav og land.

Ak, når min dag nu snart er til ende,
kunne jeg da, som blomsten der,
hulle mit hoved blødt og mig vende
trygt mod det unge morgenskær!

*Verkinto de tiu ĉi Dana poemo estas CHRISTIAN WINTHER (Kristiano Vintero, *1796 - †1876).*

Arg-244-493 (2004-06-10 11:09:37)